


LA VERDA LUPEO



8 (87) INFORMILO DE ELF-AREK – 23a jaro *1991*

Offizielles Organ der ArGe ESPERANTO im BdPh e.V.



BOULOGNE-SUR-MER 1905

1ª Universala Kongreso

DE

ESPERANTO

N° 1024



Nacio: Svedlando

Nomo: Sro Paul Nylen | Redaktoro de

Adreso: Stockholm | "Stockholms Bladet"

Subskribo: Paul Nylén

POR LA ORGANIZA KOMITATO:

La Prezidanto de la Grupo de Boulogne-sur-Mer: MICHAUX

La Sekretario

El arkivoj de Esperantistoj



Kongreskartoj de la 1a kaj 2a UK`oj el la postlasajo de la fama sveda Esperantisto: Paul Axel Nylèn (1870 - ?). Esperantisto depost 1892 (detaloj vd. sur paĝo 16)



GENÈVE 28 Aûg. - 6 Sept. 1906

2ª Universala Kongreso

DE

ESPERANTO

OFICIALA KARTO DE EFEKTIVA KONGRESANO

(Fr. 10, valora nur por unu persono).

N° [redacted]

NIA ADRESARO



G R A V A S C I I G O :	Adresŝanĝo de la redaktoro

Bonvolu noti mian novan adreson:

Rudolf Burmeister
Max-Müller-Str. 62

D-O-9051 Chemnitz

ANONCOJ



Interŝanĝo

Antaŭmilitajn stampo-rarajojn, AP kaj AF serĉas kaj antaŭmilitajn tutaĵojn ofertas: J. Mikulski, skr. poczt.30, PL-10-001 Olsztyn.

NI PRI NI



La redaktoro dankas

Al ĉiuj niaj estimataj kaj karaj klubaj geamikoj, kiuj sendis sciigojn kaj salutojn dum la pasinta jaro. Sen tiu kunlaboro ne povus ekzisti nia LVL. Mi kore petas je via komprenemo, ke momente ne eblas respondi al ĉiuj kontribuintoj.

EKSPOZICOJ KAJ NI



Mikulski en pola ekspo

Arĝentan medalon li akiris pro sia ekspozaĵo "Esperanto-internacia lingvo" en la XVI-a Nacia Pola Filatela Ekspozicio, okazinta septembre 1991 en Bydgoszcz. Ni gratulas pro la granda sukceso. Ne ĉagreniĝu, ke pli frue vi jam akiris pli altgradan medalon en samranga ekspozicio! Tian sperton jam faris ĉiuj niaj aktivaj ekspozantoj/-intoj.
Mikulski skribis, ke tio estis jam la 32a filatela ekspozicio, kiun li partoprenis. Ni deziras al vi baldaŭan resaniĝon!

ekspozaĵoj por Strażnice (CS) 1992 serĉataj

Jam pasintnumere ni informis pri tiu ekspo. Nia membro V. Hasala petas ĉiujn aktivajn eksponantojn kontakti lin pro partopreno en tiu ekspo. Dum la ekspo funkcios poŝta giĉeto kun E-stampo... kaj la ekspo-komitato preparas eldonon de katalogo kun fakaj artikoloj. Koran dankon al Hasala pro ricevitaj sendaĵoj.

Filatela Lingvistiko

ekspozi aú eksponi

"Filatela Lingvistiko" -- certe iom pompa titolo, kaj komprenu ĝin iom ŝerce. Tamen en ĝi estas spuro da vero. Mi persone sentas, ke en nia "filatela vortaro" (ja ne ekzistas tia), regas kaoso. Tio certe estas tragedio kaj la E-vortaristoj vivas kun tio jam dum 100 jaroj.Tamen eble estas nia tasko, ja ni estas ankaŭ certa-sence fakuloj, okupiĝi pri tiu temo !? Sur la paĝoj de nia informilo jam dum jardekoj ni uzas ekz.: "*eksponi*" kaj "*eksponaĵoj*". Mi opinias, ke "*eksponi*" kaj "*derivaĵoj*" el ĝi apartenu al la fotografio. La vortoj "*ekspozi*", "*ekspozaĵo*" kaj ankaŭ "*ekspozanto*" laŭ mi estas multe pli precizaj por niaj celoj. Cetere mi ne inventis tiun "*ekspozi*" kaj serĉante hodiaŭ en multaj vortaroj, mi fine ĝin trovis en la .....Esperanto - Ĉina vortaro de Gang Honfan. Pledo por "*ekspozi*" certe ankaŭ tial, ke ne ekzistas: "*eskponicio*", sed "*ekspozicio*". Mi ne volas longigi tiun artikoleton. Eble iu el inter ni estas spertulo lingvistika kaj iomete okupiĝos pri ĉi-tiu problemo.

Kio estas "Vermejla Medalo?

Jam pli ofte atingis min la demando: "Kio estas "vermejlo"? ------ Fakte jam dum jardekoj ni uzas tiun vorton. Simple pro tio, ĉar en tutmondaj ekspozicioj, sed ankaŭ en naciaj ekspozicioj ekzistas la medala rango: VERMEIL. Tiu ĉi vorto ŝajne estas franca kaj signifas: "Fajre origita arĝento". La "vermejla rango" do lokas inter ora kaj arĝenta medalrango....Kompreneble eblas ankaŭ diri: "Orumita arĝento".


KLUBANOJ SURVOJE



Goslinga ĉe Frisk

Dick kaj Thea Goslinga survoje al la Bergen-a UK gastis ĉe la familio de nia estimata klubanino Hilgon Frisk. Ili estis plene kontentaj kaj tre dankemaj. Kara Dick! Mi povas sciigi al vi, ke ni ja preskaŭ renkontiĝis tie, ĉar mi traveturis aŭtomobile la urbon de Hilgon Frisk, sed mi ne kuraĝis halti tie, ĉar ni ne estis anoncita tie.

STAMPOJ



BG 29 - Veliko Tarnovo Internacia Somera E-Universitato (st+tut)

Jen ĝojiga sciigo de nia Hlebarov el Bulgario: En Veliko Tarnovo (C) la poŝtoficejo uzis "senfinan maŝinstampilon" (sms) kun la tekstoparto (tp): "100 JAROJN ORGANIZITA ESPERANTO MOVADO EN VELIKO TARNOVO 1891 - 1991". La datstampo en la msm montras la daton: 13.7.91-14.. Pri la daŭro de la uzado nia Hlebarov nenion scias, sed li esperas trovi ion pri tio kaj ankaŭ pri la akompana koverto-tutaĵo (ISEU) en la bulgara filatela ĵurnalo. La sms estis mendita de la Bulgara E-Asocio kaj nun troviĝas en la Centra Arkivo de la bulgara MPT. Koran dankon al vi kaj koran saluton!

100 JAROJN ORGANIZITA ESPERANTO-MOVADO EN VELIKO TARNOVO 1891-1991

INTERNACIA SOMERA ESPERANTO-UNIVERSITATO VELIKO TARNOVO BULGARIO

K.Hlebarov,G.Delčev-8,
BG 2850-Petrič,Bulgario

S-ro RUDOLF BURMEISTER
W.-Firl-Str.30,
O-9047 CHEMNITZ,
GERMANIO

BG 29

Esperigaj informoj pri ĉinaj stampoj

Lastatempe atingis min denove pluraj leteroj de Ĉin Kajĝi kun detalaj informoj pri ĉinaj novaĵoj kaj la por mi plej ĝojiga informo, ke li kaj niaj Song Shengtan (koran saluton al vi!) kaj Zhang Linrui decidis, komune "purigi" kaj poluri la liston de ĉinaj stampoj. Ni esperas pri laŭeble bona rezulto. Koran dankon mi ankaŭ direktas al ZLR, kiu sendis informleteron pri novaj stampoj, pri laŭ li nepoŝtaj stampoj kaj pri dubaj stampoj. Al mi tre plaĉas, ke lastatempe aperis pluraj stampoj pri famaj ĉinaj Esperantistoj kaj amikoj de Esperanto. Pli kaj pli nun estas pli facile, konstrui bonan filatelan ekspozaĵon pri la E-movado en PR Ĉinio. Certe abundas nun novaj poŝtaj E-stampoj. Rigardu tion el la vidpunkto de por-Esperanta propagando. Neniu devigas nin voli havi kompletan kolekton. Tio certe ne eblas. Do, resume mi volus diri, ke miaj vortoj pri la mankohava kunlaboro inter ĉinaj E-filatelistoj jam parte ne plu estas aktualaj. Parte! Estus dezirinde, ke ĉiuj aktivaj kolektantoj en Ĉinio tuj detale informus la Filatelan Societon de Pekina EA, P.O.Box 1089, Beijing, TJ-100034, pri poŝtaj, jes eĉ private aperigitaj stampoj.

Ĉinaj stampoj 1991

TJ-1991-32	Changshu	07 01	Ĉina Komunista Partio
33	Changshu	07 22	Telefono ŜPC
34	Haikon	08 02	Kvaternara Esplorado
35	Haikou	08 08	E-Tago
36	Haikou	08 10	Pejzaĝo
37	Huhhot	08 15	Nadam Foiro
38	Nanchang	08 18	Fila Soc. de NJEA (mankas det.)
39	Beijing	08 26	Chen Yi - Amiko de Esperanto
40	Changshu	08 26	Sama
41	Haikou	08 26	Sama
42	Ma`ashan	08 26	Sama
43	Beijing	09 09	Hujucz - Esperantisto
44	Changshu	09 14	Inunda Helpo
45	Haikou	09 14	Sama (E-stelo)

TJ-1991-46 Zhengzhou 09 10 Kultura Festo
47 Haikou 09 20 Socialismaj atingaĵo (mankas det.)
48 Beijing 09 25 Lusin - Amiko de Esperanto
49 Changshu 09 28 PM-Kompanio Changshu
50 Changshu 09 28 Fila-Asocio Changshu

Nepoŝta: Changshu 1991 05 22: 80 jaroj de EM en Changshu
(Vidu EPĈ 10/91, p.44)

1991 - 32 Ĉina Komunista Partio

Changshu, 1991 07 01. Teksto: LA 70 JAROJ DE LA FONDIĜO DE ĈKP. Bildo de la sta jam montrita en LVL 86, paĝo 9. La bildo montras ŝipon, sur kiu kunvenis la delegitoj de la Unua Kongreso de ĈKP antaŭ 70 jaroj. La sta desegnis Zhang Linrui, kiu faris ankaŭ plurajn memorkovertojn por tiu evento.
La sta fakte estas E-a unuataga nuliga stampo. Samtage la MPT de PR Ĉinio emisiis pro la evento la pm-serion J 178 (2 pm).Unu el ambaŭ, la 20-fena, ankaŭ montras tiun ŝipon.

TJ 1991-33 Telefona reto ŜPC

Changshu, 1991 07 21. Teksto: ŜPC kaj en la ĉina: MEMORE AL LA FUNKCIIGO DE 10 000 LINIOJ DE ŜPC TELEFONO INTERŜANĜA SISTEMO EN URBO CHANGSHU. En la stampo sube pozas E-stelo. Desegnis Zhang Linrui.

TJ 1991-34 Kvaternara esplorado

Haikou, 1991 08 02. Sube: E-stelo. Teksto ĉinlingve: LA 13-A KONFERENCO DE LA INTERNACIA UNIO POR LA KVATERNARA ESPLORADO: Desegnis Zhang Linrui. PIV pri "KVATERNARA": La dua kaj lasta epoko de la kenozoika erao, ampleksante la lastan unu milionon da jaroj pasintan ĝis nun kaj dividita en du periodoj: pleistoceno kaj holoceno. (Por pliaj detalaj informoj bv. rigardu en via nacilingca leksikono sub: tertempaĝoj.)

TJ-33


TJ-34


TJ 1991-35 Dua Esperanto-Tago (DUBA !)



Haikou, 1991 08 08. Teksto: LA DUA ESPERANTO TAGO EN HAINAN. La dato en ĝi ne estas farita laŭ la poŝta normo, ŝajne mane desegnita kaj preskaŭ ne legebla. Desegnis: ??. Bildo: E-flago sur la mapo de PR Ĉinio.

Kiu povus sendi klarigojn?

TJ 1991-36 Someruma Palaco



pejzaĝo

Haikou, 1991 08.
Teksto: ĉinlingva, bildo: montaro, sube maldekstre arbaro kun la palaco. Tute sube maldekstre en arbaro la E-vorto: pejzaĝo. La Chengde-a Someruma Palaco estas tre pitoreska loko. Samtage MPT emisiis memoraj pm pri tiu loko
Desegnis: ??

TJ 1991-37 Nadam - Foiro



Huhot (Hohoto), 1991 08 15
Teksto: LA NADAM FOIRO DE IMAR. IMAR: Interna-Mongolia Aŭtonoma Regiono.
La teksto en la lingvoj: mongola, han-a kaj Esperanto.
Desegnis: Zhan Linrui
En IMAR vere aktivas Esperantistoj. En la jubilejara UK en Varsovio mi renkontis perfekte parolantan E-iston el IMAR!

TJ 1991-38 Filatela Societo de Nanchang

FONDIĜO DE FILATELA
SOCIETO DE NJEA
1991.8.18.



Nanchang, 1991 08 18.
Teksto: FONDIĜO DE FILATELA SOCIETO DE NJEA:
NJEA: Nanchang-a E-Asocio.
De nia Nanchang-a Xionglin ne venis informo.

TJ 1991-39 Chen Yi (Amiko de Esperanto

Beijing, 1991 09 09. Teksto: LA 90 JAROJ DE LA NASKIĜO DE CHEN YI: Desegnis: Zhang Linrui, ankaŭ por la sekvaj tri urboj. Pri Chen Yi legu ĉi-numere aliloke.

TJ 39



TJ 40



TJ 41



T 42



TJ 1991-40 Chen Yi Samtage en Changshu
TJ 1991-41 Chen Yi Samtage en Haikou (nur kun E-stelo)
TJ 1991-42 Chen Yi Samtage en Ma´anshan


| TJ 1991 -43 Hu Juzhi (Hujucz) |



Beijing, 1991 09 09.
Teksto: LA 95-A DATREVENO DE LA NASKIĜO DE HU JUZHI.
Desegnis: Zhang Shuxian.
La stampon uzis la Okcidentdistrikta PM-Kompanio de Pekino.
Detaloj aliloke en tiu-ĉi LVL.

| TJ 1991-44 Inundo |

Changshu, 1991 09 14,
Teksto: SAVU LA POPOLON EN LA INUNDA AREO:
Desegnis: Zhang Linrui. Ĉin Kajĝi informis, ke 1991 en Ĉinio okazis grandega inunda katastrofo. 18 provincoj kaj municipioj suferis perdojn. Por helpi al la homoj en la katastrofaj regionoj, la MPT de PR Ĉinio emisiis 80-fenan pm kaj kontribuis sumon de 1.200 milionoj da juanoj.



alvenstampo

| TJ 1991-45 Inundo |



Haikou, 1991 09 14.
Samdesegna stampo kiel TJ 44 sen E-teksto, sed kun E-stelo en la koro.



TJ 1991-46 Internacia Festo (DUBA?)

Zhengzhou, 1991 09 10-15.
Teksto: LA INTERNACIA SHAOLIN UŜUA FESTO:
Datarango ne laŭ poŝta normo, ĉar pluraj tagoj.

Bildo: Elefanto. Desegnis: Lu Chengzhi.
Uzita laŭdire de PM-Kompanio.



TJ 1991-47 Socialismaj atingoj

Haikou, 1991 09 20.
Teksto ĉinlingve: LA ATINGOJ DE LA SOCIALISMA KONSTRUADO EN PR ĈINIO: Linrui-informo sen detaloj.
Sube sub la dato E-sto.

TJ 1991-48 Lusin (Amiko de Esperanto)

Beijing, 1991 09 25.
Teksto: LA 110-A DATREVENO DE LA NASKIĜO DE LUSIN. Supozeble uzita en la Pekina Okcidentdistrikta PM-Kompanio. Pri Lusin jam pli frue ni informis. Krome legeblas pri li en pluraj numeroj de EPĈ. Lusin estis la plej granda literaturisto de Ĉinio kaj fervora amiko



de Esperanto. La stampo montras saman "manskribon" kiel tiu en la Hu Juzhi-stamp. Desegnisto do verŝajne Zhang Shuxian.

TJ 1991-49 PM-Kompanio Changshu

Changshu, 1991 09 28. Teksto: MEMORE AL LA FONDIĜO DE CHANGSHU-A POŜTMARKA KOMPANIO: Bildo: Flago inter literoj CS (CHANG-

SHU). Desegnis: Zhang Linrui. Ekzistas la sama ankaŭ por la sekva stampo. Bele farita, oficiala memorkoverto JF 17, eldonkvanto: 2000. Farita ankaŭ de Zhang Linrui, nur kun ĉinlingva teksto.



TJ 1991-50 Filatela Asocio Changshu

Changshu, 1991 09 28. Teksto: LA 3-A KONGRESO DE CSFL. CSFL: CANGSHUA FILATELA LIGO. Desegnis: Zhang Linrui. Apud la nigra koloro ankaŭ uzita viola koloro sur la memorkoverto.

TJ 1991 - aldonaj notoj

Nepoŝta:	Nanchang:	Teng-pokalo,	1991 06 20-30.
Duba:	Haikou,	nekonata,	1991 07 22-23
Duba:	Liaoyang,	Fondiĝo LYEA	1991 05 31 ☆



☆ Liaoyang

Korekto de AF-stampo INTERLAND

Nia Jan Dalet sciigis: "...Paris Muette, rue de la Pompe 16, ne estas la adreso de INTERLAND, sed adreso de la poŝtoficejo, kiu liveras la ms-n-ron SJ 98 702..." Dankon kaj koran saluton al vi!

E 23 - 51-a Hispana E-Kongreso, La Laguna

Ne el Hispanujo - el FRG min atingis la sciigo pri tiu nova hispana poŝta stampo: 51-a "HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO". Dato: 14-19 julio 1991, loko: LA LAGUNA sur la Kanaria Insulo: Tenerifo. En la stampo desegnaĵo pri kvinpinta stelo kun la cifero: "51". Certe kiel ĝis nun ĉiam aperis ankaŭ memorkarto kaj memorkoverto. Sed el Hispanujo venis nenia sciigo. Ni devas danki al nia Hirsch, li sendis tiun stampon al mi! Bildon vd. en LVL 7(86), paĝo 18.

I 47 - 62-a Itala E-Kongreso

Estis ankaŭ nia Hirsch, kiu sendis tiun novan stampon al mi. Sed ankaŭ nia Gimelli sendis ĝin rekte el la kongreso. Bedaŭrinde ĝi ne atingis min. La stampo havas la daton: 24-8-1991 el la urbo TORINO (Centro Corr. ZE) kaj ĝi montras turon kaj monton kun poŝta korno, simbolo po poŝteco. Nun venis ankaŭ letero de Gimelli kun la sciigo, ke uzita nur la 24-an de aŭgusto. En la kongresejo (Centra Universitato) dum la tuta semajno estis poŝtkesto por enmeti poŝtaĵojn, kiuj en la Centra Poŝtejo ricevu la specialan stampon. LKK ankaŭ eldonis specialan bildkarton kun kongresa alpresaĵo. La serio estas numerigita. Mi ricevis la numeron: 764.
Dankon al Hirsch kaj Gimelli pro la senditaj informoj.





62-A ITALA KONGRESO DE ESPERANTO
TORINO 23-26-8-1991
INTERNACIA LINGVO





D/09047 Chemnitz

764

2707 RIP VIETATA

Bergen-aj stampdatoj

Pluraj niaj geamikoj sciigis pri la stampdatoj. Montriĝis, ke ĉiutage la stampilo funkciis, eĉ dum la 31. 7.! Dankon al niaj Rousseau, Hirsch kaj aliaj.

Ĉu nova rumana stampo?

Nia Dick Goslinga sciigis, ke dum la 76-a UK en Bergen li aĉetis (de kiu?) rumanan stampon pri la Bergen-a UK. Feliĉe li aldonis kopion de ĝi. Pri la poŝteco oni rajtas dubi. La stampo posedas daton de la 27a de julio kun loko Timişoara. Sed tiam iu jam vendis ĝin en Norvegio.... Krome la letero posedas rumanan kaj Esperantan tekstojn pri la UK. Mi pledas por tio, atendi antaŭ ol doni katalogan numeron. Koran dankon al vi kara Dick! Dankon pro la invito. Ni deziras al vi, el tuta koro, sukceson en via kuracado.



FAMAJ PERSONOJ ★★ AMIKOJ DE ESPERANTO

Marŝalo kaj poeto Chen Yi

26an de aŭgusto 1991 MPT de PR Ĉinio emisiis pm-serion, J 181, kun la nominaloj de 20 kaj 50 fenoj honore al la 90-a naskiĝdatreveno de Chen Yi (1910-1972). Li estis eminenta ĉina politikisto, unu el la gvidantoj kaj organizantoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo kun rango de marŝalo, fama poeto kaj granda amiko de Esperanto. En 1963, dum la Unua Tutlanda Laborkunveno de Esperanto en PR Ĉinio li faris longan kaj entuziasman paroladon kaj alte taksis la funkcion de Esperanto kaj la ĉinan Esperanto-laboron. Li tiam ankaŭ proponis la okazigon de UK en Pekino, kiu estis realigita




alvenstampo

Rekomendite sendita unuataga koverto kun la pm-serio Chen Yi. Nuliga unuataga stampo el la poŝtejo Beijing 252 (okcident-distrikta).

en la jaro 1986. Tiam unu el la kongresaj salonoj portis lian nomon: Chen Yi. Unu el la pm montras lian portrëton, la dua poemon de li. Ekzistas UTK, ne-Esperanta kaj privata E-memorkoverto. Apud abundo da ne-E-stampoj ĝis nun kvar E-stampoj estas konataj lige kun la pm-eldono.

Fonto: Materialo kompilita de Filatela Societo de Pekina Esperanto-Asocio.

| Hu Juzhi - ĉina vicministro |



alvenstampo

Poŝta karto kun aldona afranko pro poŝttarifa altigo kun poŝta memoriga apudstampo pri Hu Juzhi. Sendita 1991.9.9. el Okcident-pekina pm-oficejo. Dorsflanke alvenstampo de Pekino 44 kun dato: 1991.9.10.

Hu Juzhi - Ĉina vicministro

Hu Juzhi eklernis Esperanton en la jaro 1914 kaj tra sia tuta vivo dediĉis sian energion al la Esperanto-movado. Li estis prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo ekde ĝia fondiĝo en marto 1951 ĝis sia morto en 1989. En 1984 li fariĝis membro de la Honora Komitato de UEA. Li estas tre amata kaj ŝatata de la ĉinaj Esperantistoj kaj de multaj liaj amikoj en aliaj landoj. Kelkfoje ni povis legi pri lia vivo sur paĝoj de EPĈ. Hu Juzhi estis elstara personeco en Ĉinio. Li estis unu el la pioniroj de la ĉina kultur-kaj eldona entrepreno kaj fariĝis post la fondiĝo de PR Ĉinio en 1949 gvidanto de la Eldona Administracio, vicministro por Kulturo, vicprezidanto de la Komitato por Skriblingva Reformo kaj vicprezidanto de la Konstanta Komitato de Tutlanda Popola Kongreso.

Fonto: Materialo kompilita de la Filatela Societo de Pekina Esperanto-Asocio (Ĉin Kajĝi).

CETERAĴOJ

Donaco al Internacia E-Muzeo, Vieno

IEMW petis pri kompleta ELF-AREK-Katalogo por havi superrigardon pri stampoj, glumarkoj ktp. Nia Hirsch, la kompilanto de la granda katalogo, sendis ĝin al la muzeo en Vieno kaj ricevis dankleteron.

Christian Cimpa, administranto de IEMW, esperas povi kompili glumarkan kaj pm-kolekton por povi prezenti tiujn al la kongresanoj de la venontjara UK en Vieno. Estimata s-ro Cimpa, ne faru tutjaran ekspozicion!!! La materialo plene ruiniĝos pro la daŭra lumo!

"ZEO"

ZEO estas: "Zamenhof-Esperanto-Objektoj". Raymond Bore sciigis, ke li kolektas fotojn de ZEO. Bore jam sukcesis registri kaj foti ĝis nun 113 francajn ZEO-ojn kaj alvokas niajn ELF-AREK-anojn helpi al li. Bv. kontakti lin, se vi posedas iujn fotitajn ZOE-ojn en viaj albumoj.

Lia adreso:
Raymond Bore
481, square Zamenhof
F-73000 Chambéry

S-ro Bore subtenas per sia agado la laboron de s-ro Hugo Röllinger, komisiito de UEA pri Zamenhof/Esperanto-Objektoj. Ĝis nun konataj: 850 ZEO-oj en 35 landoj. Se vi sciias ZEO-ojn en via urbo, regiono aŭ lando, tiam kontaktu:

S-ron Hugo Röllinger
Theresienstr. 23
D-W-8730 Bad Kissingen






ZAMENHOFDREEF
Ludwig Zamenhof 1859-1917
Grondlegger van het Esperanto

El glumark- kolektoj



Amikoj de la Vinjeto Antituberkuloza
FILIO DE LA
Filatelia Klubo de Vendrell
Barcelona (Hispanio), decembro (1959a)





Jen unu el la belaj glumark-folioj eldonitaj dum kelkaj jaroj de la Amikoj de la Vinjeto Antituberkoloza (AVA), filio de la Filatelia Klubo de Vendrell (Hispanujo)

Suplemento por la Jensen-Katalogo

1992 pretiĝos tiu suplemento. Dum mia trasomera tendumado apud Berlino mi okupiĝis pri kompilado de tiu suplemento helpe de LVL-sciigoj, Lindström-kolekto kaj suplementoj de Gaston Tremon. Konsternite mi rimarkis, ke kompili, tian gm-katalogon estas punlaboro. Nur nun mi komencis kompreni kian valoran laboron entreprenis nia Jensen. Kaj altvaloraj ankaŭ estis la daŭrigoj de Tremon. Li subite ĉesis sian agadon. Mi verŝajne konas la kialojn, sed ni lasu tion. Tamen, eĉ mi, siatempe ne tro atentis pri la Tremon-a laboro, sed bone konservis siajn suplementojn. Feliĉe! Do: suplemento manuskripte krude pretas. Ricevos ĝin nia Anna-Greta Strönne kaj Hirsch por kontroli mankantajn gm. 1992 tiu suplemento estos preta kaj jam nun direktu viajn mendojn al nia Hirsch, kiu espereble finpretigos kaj eldonos ĝin kadre de la katalogo.

GLUMARKOJ





Nur tre malmultaj informoj pri novaj gm atingis min ĉi-jare. Fakte nur André Sadier informis letere, Stefano Fekete gluis du hungarajn dorsleteren kaj ankaŭ Radnai sendis kelkajn. Pro manko da spaco ni ankoraŭ ne povas publikigi ĉiujn de nia klubamiko Radnai. Do, mi nun transdonas tiujn sciigojn al vi:

64-a SAT-Kongreso, Otttgnies (Belgio), 27.7.-2.8.1991
Cirklo kun la kvar ĉieldirektoj
ru, ni, ve sur blanka, memglua
bildo vd. en LVL 7(86), paĝo 18.

La informon pri la gm de Sadier, 46-a Kongreso de SAT-amikaro en Amboise-Nazelles vi trovas en LVL 5(84), paĝo 14.



Ora Duopo, Hungario 1991, Bildo: Portretoj de Kalocsay kaj Baghy, ve, ru, ni sur blanka memgula papero. Trovita sur koverto sendita de Fekete. Dankon al vi !

Kalomano Kalocsay,
1891 - 1991, Hungario
Portreto de Kalocsay,
ni kaj ora sur blanka,
memglua papero.
Trovita en letero de
Fekete. Dankon al vi.





Münster (Germanujo)
44-a IFEF - Kongreso, 16. - 22. 5. 1992
ve, ni kaj trikolora emblemo de IFEF, sur
memglua blanka papero
50x35, 16 gm sur unu folio

(IFEF = Internacia Fervojista Esperanto-Federacio)

70-a Germana Esperanto-Kongreso en Schwerin.
La unua tutgermana Kongreso post la milito en unu el la novaj federaciaj landoj.
Nia klubamiko Hirsch desegnis kaj produktis ĝin.
05 - 08 06 1992
Bildo: kastelo en Schwerin
ve sur blanka memglua papero
57 x 53



Jan TORFS
Vrijgeweide 27
B - 2200 BORGERHOUT
BELGIE

Poŝtkarto





Ilustraĵo el "Kristnaska Triptiko"
de Felix Timmermans (1886 - 1947)

Al ĉiuj niaj karaj klubaj geamikoj ni deziras feliĉajn festotagojn dum Kristnasko 1991 kaj sanan kaj pacan Novan Jaron 1992! Por ilustracii niajn bondezorojn, ni uzas E-an poŝtkarton kaj pm kaj sta memore al Felix Timmermans. Li estis fama belga verkisto (1886-1947). Siajn verkojn li mem ilustraciis kaj sur tiu poŝtkarto ni trovas lian ilustraĵon el la "Kristnaska Triptiko" kun la E-enskribo: "PACO PER ESPERANTO".

Kongreskartoj -- historiaj dokumentoj

Kiam 1991 mia edzino kaj mi gastis ĉe nia Anna-Greta Strönne en Malmö. mi ricevis de ŝi valoran memorlibron pri la sveda E-isto Paul Alexander Nylén el la plumo de ŝia edzo Jan Strönne. En ĝi mi trovis interesajn kopiojn, i.a. kopiojn de kongreskartoj de la I-a kaj II-a UK! Tiuj objektoj nepre estas kolektindaj kaj mi mem posedas multajn el diversaj E-kongresoj. Nia Anna-'Greta Strönne rakontis. ke la kongreskartoj troviĝas en granda postlasaĵo de Nylén, kiu kuŝas jam depost jardekoj en ŝnurumitaj kestoj en la arkivo de Sveda Esperanto-Federacio en Stockholmo.Netuŝita! Do, mi faris kopiojn kaj ĝojas povi tiujn montri al vi.

Informilo de ELF-AREK (Esperanto-Ligo Filatelsita kaj
Amika Rondo de Esperantaj-Kolektantoj)

Offizielles Organ der ArGe Esperanto im BdPH e.V.

Redakcio ĉe: Rudolf Burmeister
Max-Müller-Str. 62
D-O-9051 Chemnitz

Prezidanto: Ivar Paulsson
Skytteholmvägen 29
S-17144 Solna


Kasisto: Rolf Beau
Jacobstr. 9
D-O-7010 Leipzig

Poŝtĝirokonto de Beau: Poŝtĝiro-Oficejo Nürnberg
Bankkodnumero: 780 100 85
Konto-No: 3667 37-855

Kotizoj 1992: DM 21,--/15 IRK/12 US $

Stampobanko: Werner Heimlich
Fröbelstr. 4
D-W-3040 Soltau

Kompostis + ekspedis: Richard Hirsch
Lambertstr. 12
D-W-6430 Bad Hersfeld



Presado: Albert Oesterle, Hubertusstr., 28, D-W-8853 Wemding